# TEA-BULTENO

1ª JARO | OKTOBRO 1998 | NUMERO 8

## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| 1 | Ĵ | |
| 2 | V | Ankoraŭ pri U.K. en Montpeliero |
| 3 | S | |
| **4** | **D** | |
| 5 | L | |
| 6 | M | Ordigo de nia arkivo |
| 7 | M | |
| 8 | Ĵ | |
| 9 | V | EL NIA MOVADO *(Anita)* |
| 10 | S | |
| **11** | **D** | |
| 12 | L | |
| 13 | M | Ordigo de nia arkivo |
| 14 | M | |
| 15 | Ĵ | |
| 16 | V | Ni esploru nian bibliotekon |
| 17 | S | |
| **18** | **D** | |
| 19 | L | |
| 20 | M | Ordigo de nia arkivo |
| 21 | M | |
| 22 | Ĵ | |
| 23 | V | Lumbildoj pri Cipro *(Anita)* |
| 24 | S | |
| **25** | **D** | |
| 26 | L | |
| 27 | M | Ordigo de nia arkivo |
| 28 | M | |
| 29 | Ĵ | |
| 30 | V | Itala Kongreso en Frascati *(Edvige)* |
| 31 | S | Bunta vespermanĝo zorge de Susy & Silvio |

## EL NIA MONDO

**Nobel-premio** - Laŭ iniciato de la verkisto Manuel de Seabra, tri Esperantaj instancoj - ESPERANTLINGVA VERKISTA ASOCIO, ESPERANTA PEN CENTRO kaj INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO en Vieno - kandidatigis William AULD por la Literatura Nobel-premio pro lia verkado internacilingva. En Montpeliero, dum la EVA-jarkunveno, estis preparita la letero, Esperant- kaj sved-lingve, kaj sendita al Svedio al la Komitato de la premio. EVA pret-igas dokumentaron pri AULD kun impona, detala prezento de lia poezia, esea kaj traduka verkado. Pri tio raportis belga, nederlanda kaj franclingvaj gazetoj.

**Kafejo Esperanto** - Inaŭguriĝis en Montrealo *Cafè Esperanto*, kies posedantino ofertas trinkaĵojn kaj manĝaĵojn el plej diversaj partoj de la mondo. La ejo troviĝas centre de la Kanada urbo.

## *Korespondi deziras*

Mi estas 29-jara fraŭlino kaj laboras kiel oficistino en Tehran. Mia plej granda revo estas viziti aliajn landojn. Mi eklernis antaŭ nelonge Esperanton: mi estos tre danka al tiu kiu ekkorespondos kun mi, tiel mi pli bone lernos nian lingvon kaj plie, pere de li/ŝi, mi ekkonatiĝos ankaŭ kun via Lando.

**SEPIDE LA'L** - n. 14 Tabaghe Aval - K:7 - Kh: Asli
Tehransar code: 13887 - Tehran - IRAN

## Esperanta Turisma Societo Ljubljana

Tavĉarjeva 2
1001 Ljubljana

**Oktobra programo** - ĉiuĵaŭde je la 19.30

| | |
|---|---|
| 01.10.98 | Sen programo |
| 08.10.98 | Impresoj el Oriento |
| 15.10.98 | Lingva vespero |
| 22.10.98 | Diapozitivoj pri Alpoj |
| 29.10.98 | Diapozitivoj pri Salzkamergut |

Tie kaj tie plukitante... Zorge de Elda Doerfler



## Babelo? Ne plu ekzistas!

La plej ofta demando, kiun nescianto pri nia lingvo aldirektas al esperantisto jenas: Kiom da esperanto-parolantoj en la mondo? Jes, ne tiom interesas la ecoj aŭ malecoj de la lingvo, ĝia indeco aŭ malindeco, ĝia lernofacileco aŭ malfacileco: gravas kiom da.

En hodiaŭa mondo ciferoj estas esencaj. Per la kvanto da mono posedata de iu ajn oni prikonsideras lian/ŝian valoron. Internaj valoroj ne mezureblas, ne kvantumiĝas, tial do, ili tute ne ĉefrolas en la vivoludo. Abundas en gazetoj kaj magazinoj listoj de homoj kiuj sidas sur la plej dezirataj, superaj pintoj: la plej riĉa, la plej populara, la plej bela, la plej eleganta, la plej... krima... Amasa legantaro ensuĉas tiujn klaĉvortumojn kaj strebas, en sia eteco, imiti tiujn kvalifikitajn la plej feliĉajn homojn sur nia tero, ne rimarkante kiom efemera foje estas tiu ilia grandeco aŭ supereco. *Tiel la mondo iras...* kantas nia tre bone konata Juliano kaj ni devas akcepti ĝin kia ĝi estas kun siaj virtoj kaj malvirtoj: ĉiu mem responsas pri siaj konduto kaj agoj kaj nur propra konscienco povas juĝi.

Sed ni revenu al ciferoj kaj statistikoj. Interrete navigas la ĉiama, koŝmara demando: *Kiom da parolas Esperanton?* Nun oni provas trovi respondon. Kiel? Jen kion diras Walter Klag, Vieno (AT): «La reta serĉmaŝino *Alta Vista* trovas 18 000 000 retpaĝojn *(web-sites)* kun la vorto *english* (=angla) kaj 200 000 paĝojn kun *esperant*. La proporcio estas 82:1. Kiel gepatran lingvon parolas la anglan 340 000 000 en la tuta mondo. Laŭ la sama proporcio parolus Esperanton 4 000 000.»

Kion vi pensas pri tio ? Ĉu ĝustas tia komparado? Ĉu fidindas?

Pli kaj pli oftas la demando pri kiom da homoj parolas iun nacian lingvon, ĉefe nun en Eŭropa Unio, kiu devos iam respondi al tiuj kiuj atentingas pro la problemo de lingva interkompreniĝado en onta unuiĝo de diversaj ŝtatoj. Kiel sciate, temas ankaŭ pri la danĝero de malaperigado de pluraj etnaj lingvoj, kaze de adopto de iu nacia lingvo kiel komuna interkomprenilo. Kaj nun ni primeditu la frazon en artikolo de la monata magazino Focus, Julio 1998, eldonita de Mondadori.

«Ne nur besto-specioj riskas neniiĝi, sed ankaŭ reduktiĝas iom post iom la homaj lingvoj: renversita Babel-turo!

**10 mil** lingvojn parolis 10 milionoj da personoj antaŭ 15mil jaroj. Ili ekmalpliiĝis kiam la prahomoj, tiam ĉasistoj, et-arigitaj, transformiĝis al bredistoj-terkultivistoj, formante ĉiam pli nombrajn grupojn.

**6 mil** oni kalkulis la lingvojn nuntempe parolatajn tra la mondo.

**3 mil** estas la lingvoj kiuj, laŭ la amerikaj lingvistoj *Michael Krauss* kaj *Gail Vines*, malaperos fine de la venonta jarcento.

**2 mil** estas la tiel diritaj «nepopularaj» lingvoj, perfekte konataj de ne pli ol milo da personoj.

**600** estas la lingvoj kiuj, laŭ antaŭvido de lingvistoj, tre probable sukcesos pluvivadi.

**250** estas la dialektoj de la aŭstraliaj aborigenoj, kaj preskaŭ ĉiuj riskas formorti pro subpremado de la angla lingvo.

**100** estas la idiomoj de Norda kaj Suda Ameriko kiuj nuntempe estas konataj de malpli ol 300 personoj.

**30** estis la lingvoj parolataj kaj instruataj ĝis antaŭ kelkaj jaroj en la nordaj teritorioj de eksa Sovet-Unio. Hodiaŭ oni lernas nur la rusan kaj anglan lingvojn, krom la loka idiomo.

**2** estis la personoj ankoraŭ konintaj la lingvon de la *Gafa* tribo (Etiopo). Ili mortis pro malvarmumiĝo, kiam iu lingvisto konvinkis ilin translokiĝi kun li de varma malaltebenaĵo, sub la marnivelo, al pli freŝa regiono de iu altebenaĵo.»

Se veras ĉi tiu nombrado, estas la momento, kvankam jam tro malfrue, por forte aktiviĝi por ke ni ne perdu tiom da lingvoj kaj konsekvence tiom da historioj kaj kulturoj, kiuj estas valoraĵoj de la tuta homaro, kiuj diferencigas ĉiun homon unu de la alia, donante reciprokan riĉigon: jes unueco, sed tamen en diverseco!



Nur antaŭ kelkaj tagoj (finfine!) alvenis la rezulto de la


## 11ª Finalo de Ŝakludo
### Turniro F/94-96
### 01.06.1994-31.12.1996

Jen la poentoj akiritaj de la 13 ludintoj per 12 partioj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1ª | Bo Wiker, Svedio | poentoj | 11 |
| 2ª | Pier Giorgio Soranzo, Italio | " | 10 |
| 3ª | Horst Hilliger, Germanio | " | 9 |
| 4ª | Jaromir Canibal, Ĉeĥio | " | 8,5 |
| 5ª | Michael Schulz, Germanio | " | 7,5 |
| 6ª | Karlis Vitols, Latvio | " | 7 |
| 7ª | G. Barsĉiauskas, Litovio | " | 6 |
| 8ª | Eric Krustkalns, Latvio | " | 5,5 |
| 9ª | E. I. Kurĉatov, Rusio | " | 4,5 |
| 10ª | Miroslav Lojkoviĉ, Slovakio | " | 3 |
| 11ª | Nikolo Zuravlev, Latvio | " | 0 |
| 12ª | Ivan Domankusiĉ, Kroatio | " | 0 |
| 13ª | Anatolij Sidorov, Rusio | " | 0 |

El la 12 partioj, Wiker gajnis 11: li malgajnis nur kontraŭ Soranzo, kiu iĝis la **vic-mondĉampiono**.

Gratulojn al nia amiko kaj Tea-ano **Pier Giorgio Soranzo!**



Bulteno de la membroj de
Triesta Esperanto-Asocio
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128; reto: nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro
Poŝtĉekkonto N° 10834349